

# La Brita Esperantisto

Numero 981  
Aŭtuno 2016



**Paul Gubbins: 1949-2016**

**Ni adiaŭas "la gajulon kun la barbo"**

- 4 • Plurlingvula Renkontiĝo 2016**
- 5 • La Brita Kongreso en Liverpolo**
- 6 • Vere regi Esperanton**  
*Cherrelle Smith pri la Brita Kongreso*
- 8 • Fratulo de EAB**  
*Helen Fantom*
- 9 • Dua Buchanan-Majstroklaso**
- 10 • Vivcelebro de Paul Gubbins**  
*Joyce Bunting*
- 11 • Nekrologo**  
*Tim Owen*
- 14 • “Paul Gubbins”**  
*Jorge Camacho*
- 18 • Paĉjo kaj mi**  
*Jill Gubbins*
- 20 • Ni kondolencas**
- 22 • Journey into Esperanto**  
*Kat Newbould pri Lernu Plu*
- 25 • Jam la cent-unua**  
*Universala Kongreso*
- 26 • Nitra arto**  
*Hilary Chapman*
- 27 • Jubilean gratulon!**  
*Terry kaj Anica Page*
- 27 • Nova redaktoro?**
- 28 • La mirinda mondo de muzikiloj**  
*Andreo Marshall*
- 30 • Barlastono bonvenigas**  
*Kelly Payne kaj Damon Lord pri la Somerlernejo*
- 33 • KER-ekzamenoj**  
*Renato Corsetti*
- 34 • Kiu kiuis?**  
*pri H. B. Mudie*
- 39 • Memorige al Mudie**
- 42 • Fuĝo ne eblas**  
*Clare Hunter*
- 46 • Bildbabile**

redaktis: **Ian Carter** kun helpo de **Tim Owen**

ian.carter@esperanto.org.uk

tim.owen@esperanto.org.uk

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**

eab@esperanto.org.uk

Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE

telefone: +44 (0)1782 372141

aŭ en Britio: 0845 230 1887

fakse: 01782 372393

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

ISSN 0007-067X

fasonis: Ava Rowell

enpaĝigis: Simon Davies

presis: Panda Press

limdato por la printempa numero:

28 februaro 2017

*La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare. Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB. Nemembroj povas aĉeti LBE de la EAB-libroservo en Barlastono.*

**Ni normale ne akceptas paperajn kontribuojn.**

**Kontribuoj estu sendataj elektronike kiel ODT, DOC(X), RTF, aŭ plata teksto.**

**Fotoj estu memstaraj kunsendaĵoj, apartaj de la akompana teksto.**

Originalaj fotoj en LBE ne estu represitaj en aliaj publikaĵoj, ĉu paperaj, ĉu elektronikaj, sen permeso de la redakcio de LBE kaj ĉiaokaze sen fontindiko.

ĈI-NUMERE okazas gravaj ŝanĝoj al *La Brita Esperantisto*. Unue, ni malfeliĉe perdis nian altestimitan redaktoron, d-ron Paul Gubbins, kies infekta rideto tiom influis ĉiujn, kiujn li renkontis. Tim Owen, kiu bone konis Paul, verkis mult-ampleksan nekrologon, kaj pri la memoriga servo kortuŝan artikolon kontribuis Joyce Bunting.

Sen tia erudicia aŭtoritatulo, kion ni faru?

Nu, antaŭ ol forpasis Paul, mi mem decidis proponi min por provizore helpi kunmeti la diversajn elementojn de la revuo. Jam dum la jaroj sepdekaj mi redaktis la revuon *Kial Ne?* de Junularo Esperantista Brita, do mi havas iom da sperto pri tiaj aferoj. Verŝajne miaj prioritatoj ne estas tute samaj al tiuj de Paul, sed tion oni eble atendas, kiam nova oficulo prenas al si tian rolon.

La taskoj de *LBE*-redaktoro bezonas multe da tempo, kaj ĉiam estas risko, ke la rolo kreos tro da laboro por unu homo. Eĉ kun helpo de la sciplena Tim Owen, restas iuj malfacilaĵoj, kiujn ni devis konkeri. Feliĉe, nia skipo inkluzivas tre spertan paĝkreston - Simon Davies - kiu bonkore konsilis nin pri tio, kion bezonas la revuo.

Krome, ni invitis kontribuajon

de Andreo Marshall, kiu skribis pri ekspozicio ĉe la 100-a Universala Kongreso pasintjare en Lillo, Francio. Ĉar Andreo estas sperta kaj lerta muzikisto, ege fascinis lin elmontro de antikvaj muzikiloj - kiuj inkluzivis ĉevalmalkzelon!

Tim adaptis sian prezenton pri la "pinta pioniro" - Harold Bolingbroke Mudie - kaj ni fieras havigi ĝin al vi ĉi tie.

Ankaŭ raportas studentino, kiu partoprenis novstilan kurson ĉe la Esperanto-Domo en Barlaston. Kat Newbould skribas pri *Lernu* kaj *Lernu Plu*, kies bazan nivelon gvidas la ĉiam afabla Malcolm Jones, dum Tim Owen kaj mi mem kutime stiras la pli altan gradon. Aglokulaj legantoj tuj rimarkos, ke tiu artikolo estas en la angla lingvo, dum ni havas "regulon", ke ĉio en *LBE* aperu esperantlingve. Estas bona kialo por ĉi tiu escepto: ni volas sciigi al ĉiuj - eĉ ankoraŭ-ne-komencintoj - ke niaj modernaj kursoj ja vere partoprenindas!


Kaj tiel plu, kaj tiel plu ... mi nenion plu diros ĉi tie, ĉar mi ne volas frustrigi la surprizon! En via ĉi-foje 48-paĝa revuo, vi ja trovos multe da interesajoj; tamen, se estas io alia, kion vi dezirus legi en ĉi tiuj paĝoj, nepre sciigu min!

Bonan legadon! ■

# Plurlingvula Renkontiĝo 2016

ĈIRKAŬ 350 lingvemuloj el 50 landoj ĉeestis la *Polyglot Gathering*, starigitan de esperantistoj kaj okazintan en Berlino de la 5-a ĝis la 8-a de majo. EAB finance subtenis la aranĝon, kiu permesebligis reklami Esperanton laŭ kunteksto de “sponsoro” en la kunvena literaturo, kaj disdoni flugfoliojn al la ĉeestantoj.

Ni elektis kuraĝigi lernadon de Esperanto pere de Duolingo, kun invito esti la 400 000-a homo aliĝi al la kurso. Hodiaŭ, nur iom pli ol unu jaron ekde ĝia estiĝo, la kurso bonvenigis pli ol duonmilionon da lernantoj. ■



La nomŝildo de Richard Simcott, kiu parolas pli ol 40 lingvojn.

Kia estas lia Esperanto-kapablo? Kontrolu mem ĉe [Ibsp.org/richard-simcott](https://www.iesp.org/richard-simcott).

# Esperanto en la *Beatles*-urbo

LA 97-a Brita Kongreso de Esperanto okazis ĉe *Gateway Centre*, Liverpolo, de la 18-a ĝis la 20-a de marto.

Gastpreleganto Kalle Kniivilä vojaĝis al Britio por prezenti siajn librojn *Homoj de Putin* kaj *Krimeo estas nia*. John Wells instruis pri la liverpola dialekto, Guilherme Fians pri sia hejmlando Brazilo, kaj Hilary Chapman prelegis pri Edith Alleyne Sinnott, loka virino, kiu fariĝis la unua romanistino Esperanta.

Leĝera kvizo pri Liverpolo malfermis la aranĝon, konkursantoj kantis *Beatles*-kanzonojn, kaj Rolf Fantom kaj amikoj regalis per komedia kvizo sabaton vespere. Tim Owen prezentis Harold Bolingbroke Mudie okaze de la jubileo de lia morto, kaj la prilaboratan retejon de EAB. Helen Fantom dividis sian sperton pri infanoj en Esperantujo, kaj elektiĝis Ian Carter kiel nova prezidanto.

La venonta kongreso estos kuna aranĝo en Edinburgo inter EAB kaj la Esperanto-Asocio de Skotlando, ĉe *The Melting Pot* de la 19-a ĝis la 21-a de majo. Detaloj aperos en *Update* kaj ĉe [britakongreso.org](http://britakongreso.org). ■



VILČJO WALKER

Elizabeth Stanley kun kelkaj el la unuafojuloj.

Kalle Kniivilä, gastpreleganto.



La kutiman sabatvesperan programon – la komedian kvizon – prezentis Rolf Fantom, helpe de Ed Robertson, Peter Bolwell, Kalle Kniivilä kaj Harry Barron.



# Vere regi Esperanton

Cherrelle Smith

DANKE al NoJEF, la 18-an de marto mi trajnvojaĝis al Liverpolo por ĉeesti la Britan Kongreson de Esperanto 2016.

Mi volis tien iri precipe por renkonti aliajn esperantistojn kaj ekparoli kun ili. Kiel lingvistudema homo mi tute komprenas, ke oni bezonas multe paroli lingvon por plibonigi sian regon de ĝi. Pro tio, kiam mi eksciis pri la evento, mi tute ne volis perdi la okazon vere uzi la internacian lingvon kun aliaj parolantoj.

Krom perdiĝi en la urbo de Liverpolo ĉiufoje, kiam mi estis sola, mi tre ĝuis la sperton ĉeesti la kongreson. Dum la tuta semajnfino, spektetis multe da prelegoj pri diversaj temoj en la kongresejo, kaj estis tre interese aŭskulti ilin kaj

lerni pri malkomunaj temoj per Esperanto. Mi aparte ŝatis la prezenton pri la skaŭsa, la loka dialekto de Liverpolo, ĉar la prezentanto John Wells lernigis al mi multe da esperantaj vortoj rilataj al lingvistiko, temo, kiu tre interesas min. Mi ankaŭ ĝuis aŭskulti la prelegon de Heleno Fantom pri la infanoj en

Esperantujo, ĉar ŝi bele montris, kiel familio povas vivi per ĉi tiu planlingvo.

Aparte de la prelegoj estis ankaŭ kvizeto, kiu temis pri Liverpolo kaj *the Beatles*, kiu malfermis la kongreson; komedia kvizo, kiu tre amuzis min kaj klare montris al ni komencantoj, kiel oni



VILĈJO WALKER

Cilla Black, alinome Elizabeth Stanley.





VILĈJO WALKER

esperantistoj en tiu ĉi kongreso surprizis min, sed mi aparte rimarkis, ke tiu montris ankaŭ, ke ekzistas junuloj, kiuj ankoraŭ volas lerni la internacian lingvon, kaj tiu ĉi fakto vere feliĉigis min.

Mi esperas povi ĉeesti pli da similaj esperantaj eventoj

estontece, por spekti la kreskigadon de la lingvo kaj reveni al Esperantujo. ■

povas vere regi Esperanton; kaj eĉ kanzona konkurso, dum kiu diversaj homoj kantis esperantigitajn *Beatles*-kanzonojn kaj ni spektis la reaperon de “Cilla Nigra”, alinome Elizabeth Stanley. 8-jaraĝa Maggie Payne estis la ĉefa juĝisto kaj trafe decidis elekti du gajnintojn: Peter Bolwell pro sia *Venu Kune*, kaj Elizabeth Stanley.

Kion mi aparte ĝuis estis renkonti aliajn komencantojn, kun kiuj mi povis ĝui la eventon. Fakte, la ĉeesto de tiom da novaj

**Cherelle Smith** estas 25-jaraĝa kaj studis la hispanan kaj la italan ĉe universitato. Ŝi komencis lerni Esperanton per Duolingo, Lernu! kaj YouTube, kaj en 2015 unuafoje renkontis esperantistojn, ĉe aranĝo en Jorkŝiro. Ŝi plibonigis sian Esperanto-kapablon per iTalki, kaj renkontis en lingvolernada forumo Clare Hunter, kiu invitis ŝin al Liverpolo.



VILĈJO WALKER

Peter Bolwell kantas sian tradukon de *Come Together*.

◀ Guilherme Fians, studento ĉe Manĉestro, prezentis sian hejmlandon, Brazilon.

# Dankon, Heleno!

PAROLIS en la Brita Kongreso en Liverpolo pri siaj spertoj kun junuloj en Esperantujo Heleno Fantom. Kaj bone por ni, ke ŝi ĉeestis, ĉar tiel ni havis okazon agnoski la kontribuojn, kiujn faris Heleno dum jardekoj.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, EAB dankas al homoj pro ties pasintaj tempoferoj por Esperanto per transdono de atestilo, kiu agnoskas, ke la ricevinto estas Fratulo de la Asocio.

Malkiel la plejparto de la membroj de EAB, Heleno ne elektis Esperanton. Ŝi naskiĝis en Esperanto-familion en 1941, unua infano de nederlanda patro kaj angla patrino.

Tial ŝi denaske parolas Esperanton, kaj Esperantujon neniam forlasis. Ŝi estas eĉ patrino de tri denaskaj parolantoj kaj en decembro fariĝis avino de infano kiu, kiam li kapablos paroli, estos la kvara generacio de Esperanto-parolantoj en la familio.

Dum la jardekoj Heleno okupis la oficon de prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo, estis



UK-organizanto, kaj ĉiam la unua alveninta, lasta foririnta, kiam EAB ĉeestis *Language Show* en Londono. Precipe la kontribuoj de Heleno

temas pri homoj: ŝi okupiĝis pri la infankongresetoj, kaj en lastaj jaroj pri flegado de membroj de la Esperanto-familio, kiuj pro malsano suferas. Kviete kaj senfanfarone ŝi provizas ilin per amikeco kaj subteno.

Ĝuste tion celis Tim Owen, kiam li klarigis al la ĉeestantaro, ke ricevas Heleno tiun agnoskon “pro sia kontribuado dum jardekoj al kaj Esperanto kaj Esperantistoj, kaj junaj kaj maljunaj”.

Varme salutis la ĉeestantaro, kiam John Wells, honora prezidanto de EAB kaj longdaŭra amiko de Heleno, fiere transdonis al ŝi la atestilon, kiun ŝi plene meritias. ■





## Klaso de majstroj

ĈI-PRINTEMPE Liverpolo gastigis paron da Esperantaj eventoj: ne nur la Britan Kongreson sed ankaŭ, tuj antaŭe, la duan Buchanan-Majstroklason ĉe la ejo *Foresight Centre* de la universitato. Ĝin organizis Angela Tellier kun subteno de EAB.

La programo proponis tri ĉefajn seminariajn fadenojn, el po ok sesioj; ekzemple Paul Gubbins gvidis diskutojn por analizi kelke da gravaj Esperantaj literaturaj tekstoj. Kvar aldonaj sesioj esploris Esperantan gramatikon.

**Okazos la Prelego John Buchanan 2016 jaŭdon la 20-an de oktobro**, kiun Angela Tellier starigas por la Universitato de Liverpolo. Ĝi estas senkosta, malferma al la publiko, kaj okazos de la 16-a horo ĝis la 18-a en Taylor Room, Sydney Jones Library.

Prelegos Profesoro Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) pri “Phraseology as a Mirror of Culture – A Survey with Examples in Esperanto, English and German”. Aldonos plian eron Profesoro Wim Jansen (Universitato de Amsterdamo): “Esperanto, a gateway to lesser-known cultures – Uncovering the phraseological wealth of Basque”.

Post periodo, dum kiu ili konsideris prioritatojn, la kuratoroj



VILČO WALKER

En Liverpolo, Anna Löwenstein instruis la lingvon al komencantoj kaj postkomencantoj. Wim Jansen diskutigis tiklajn aspektojn de Esperanta gramatiko. Renato Corsetti (fotite) kaj Duncan Charters prezentis sesiojn pri Esperanto-kulturo, por pli spertaj parolantoj.

decidis forigi la rolon de kunordiganto pri esplorado, kun la bedaŭrinda konkludo, ke Angela ne plu estas dungita de EAB. Ni petas, ke se vi povus ĉeesti la Prelegon Buchanan, vi subtenu ĝin. Ni tre dankas al Angela pro ŝiaj pasintaj kontribuoj, kaj deziras al ŝi sukceson en venontaj projektoj. ■

# Vivcelebro de homo eksterordinara

Joyce Bunting

LA komuna halo de Mossley en la antaŭmontetoj de la Peninoj superbordiĝis pro familianoj kaj geamikoj de Paul Gubbins, kiuj kunvenis por celebri la vivon de eksterordinara homo, la 19-an de aŭgusto 2016.

Ĉeestis dek du esperantistoj. Tim Owen parolis pri la fruaj Esperanto-jaroj de Paul, kiam Bill Auld kaj Marjorie Boulton estis liaj 'onklo kaj onklino'. Fine li transprenis taskon de Bill redakti *La Britan Esperantiston*, kaj de Marjorie estri la Somerlernejon.

Jill, filino de Paul kaj ankaŭ esperantisto, rakontis pri neforgeseblaj spertoj, kiujn ili kune ĝuis inter homoj el la tuta mondo dum Universalaj Kongresoj.

Ario el la opero *Princess Ida* de Gilbert kaj Sullivan; deklamo de la humura monologo *Albert and the Lion*; sonregistraĵo de Paul ludanta kun ĵaz-grupo el loka U3A; kaj paŭzo por mediti dum aŭdigo de *Stranger on the Shore* de Acker Bilk – ĉiu programero vokis memorojn el la vivo de tiu multtalenta viro.



Geamikoj omaĝis lian amon al katoj, ranoj, *Mini*-aŭtomobiloj kaj fervojoj; lian kapablon ludi saksofonon kaj klarneton; lian entuziasmon pri modela fervojo memkonstruita en la ĝardeno; lian mirigajn intelekton kaj memorkapablon.

Eltondaĵoj sur la muroj atestis pri la malĝojo, kiun sentis kaj kolegoj kaj studentoj de Paul ĉe la Universitato de Staffordŝiro. "Li estis legenda lekciisto pri komunika juro," iu skribis. Liaj instrueroj ja estis viglaj prezentoj.

Li estis humanisto. Laŭ iu, li estis "senbrida maldekstrulo, avida pri socia respondeco". Tial en 1983 li kandidatiĝis al parlamento sub SDP-insigno.

Dumviva amiko konsilis: "Ni honoru Paŭlon per rideto." Aliaj memoris, ke li estis "viv-abunda": "Oni ne povas diri lian nomon sen ridi."

Antaŭ ĉio, familio plej valoris al li. Portreto de Paul sur kovrilo de la celebra programo montris lin ridetanta kiel kutime, kaj aludis al 'la ĝajulo kun la barbo'. ■

LA 6-an de aŭgusto 2016, neatendite dum li dormis, forpasis Paul Gubbins en la aĝo de 66 jaroj. Li estis talentoriĉa verkisto, ĉefredaktoro de *Monato*, membro de la Akademio de Esperanto, kaj prezidinto de la Esperanto-Asocio de Britio.

Paul Phillip Gubbins naskiĝis la 8-an de novembro 1949 en Southport, nordokcidenta Anglio, la sola infano de Ron kaj Nelta Gubbins. Li edukiĝis ĉe la Universitato de Manchester, kie li studis lingvojn, precipe la germanan. En 1977 li ekstudis ĉe Queen's University, Kanado, kie li la postan jaron doktoriĝis kun disertacio pri la 19a-jarcenta germana verkisto E.T.A. Hoffmann.

Li renkontis Anne Duffell en 1976, kiam ŝi estis en amrilato kun lia amiko, Robert. Post la finiĝo de la amrilato, Anne kaj Paul restis en kontakto. En 1977 Anne flugis al Kanado por pasigi tempon kun Paul, dum li studis tie, kaj je la 7-a vespere de la antaŭtago de la nova jaro, li surgenuiĝis por proponi geedziĝon. Li poste klarigis, ke la horon li intence elektis, ĉar en la hejmlando ĝuste tiam novjariĝis. La paro geedziĝis en 1978 kaj transloĝiĝis al Leek, Staffordshire, ĉar Paul ekhavis laborpostenon en

Buxton, instruante la germanan en lernejo.

Aperis en 1980 la unua infano, Richard George. Lin sekvis en 1982 Jill Nelta. Ambaŭ infanoj ŝuldas siajn nomojn al operoj de Gilbert kaj Sullivan – Paul estis dumvive ŝatanto kaj promesigis Anne, ke la eventualaj infanoj nomiĝos laŭ roluloj en la verkoj. Kun Jill li ĉeestis ĉiun ĉiujaran festivalon de Gilbert kaj Sullivan – la duopo patra-filina intencis partopreni la ĉi-jaran por konservi la tradicion.

Profesie li laboris kiel lingvo-instruisto (en lernejo en Buxton kaj poste ĉe la Universitato de Salford), ĵurnalisto, kaj lektoro pri ĵurnalismo ĉe Staffordshire University ekde 2005 ĝis somero 2016.

Paul esperantistiĝis en 1984, jam plenkreskulo. Li ofte esprimis bedaŭron, ke li ne havis la okazon sperti la junulan vivon esperantujan. Tiel li estis tre kontenta, kiam Jill propraj iniciate interesiĝis pri la aventuroj



Tre kontenta ĉe statuo de E.T.A. Hoffmann.

de la patro en foraj landoj, kaj decidis eklerni Esperanton por povi kun li vojaĝi al kongresoj. Ili kune vojaĝis al infankongresetoj en Tampere (1995) kaj Prago (1996), kaj al la plenaj Universalaj Kongresoj en Montpeliero (1998), Berlino (1999), Zagrebo (2001), Pekino (2004), Florenco (2006), Jokohamo (2007), kaj Roterdamo (2008). Paul, kompreneble, ĉeestis plurajn aliajn senfiline.

Ne longe post sia esperantistiĝo Paul komencis verki, kio fariĝis poste vivdaŭra okupiĝo. Li verkis teatraĵojn (ekzemple, la vidbendserion *Pasporto al la tuta mondo*) kaj lernolibrojn, inkluzive de *Kunvojaĝu!*, pro kiu li ricevis la premion OSIEK. Premiojn Liro li ricevis en 2002 pro la rakonto *Finsezono*, kaj en 2005 pro *Amikaro*. Plurfoje li premiigis en la belartaj



konkursoj de UEA, ne nur en la branĉo teatro, sed ankaŭ pro siaj kontribuaj vidbendaj kaj prozaj. En la branĉo teatro li estis ĝismorte unu el la juĝantoj.

Sian kernan kontribuon li faris en 2012, per la publikigo de la antologio *Star in a Night Sky*. Per tiu anglalingva libro li prezentis la esperantan kulturan heredaĵon al la ĝenerala publiko. La eldonejo

Francis Boutle kontaktis lin por esplori pri la eblo aldoni libron pri Esperanto al sia serio *Lesser Used Languages in Europe*, kaj Paul tuj “faligis ĉion” (t.e. flankenmetis la aliajn verkataĵojn) por kompili kaj aranĝi tiun sian majstroverkon. En ĝi li elektis poemojn, prozon, eĉ traktaton kaj recepton, kaj prezentis ilin kun tradukoj en la angla (fare de pluraj helpemaj kontribuintoj) kaj redaktoraj komentoj por prezenti la verkojn kaj tiel Esperanton mem.

Paul ekkontribuis al *Monato* jam en 1986, kaj ekrespondecis pri pluraj ĝiaj rubrikaj artikoloj, inkluzive de moderna vivo (ekde 1992) kaj politiko (ekde 1993). En 2011 li atingis la postenon ĉefredaktoro, post la emeritiĝo de Stefan Maul.

La kontribuoj de Paul al Esperanto ne limiĝis al perplumaĵoj. En la klaŝĉambro li instruadis – ekde 1993 li gvidis la ĉiujaran kvintagan Somerlernejon de EAB, kiun starigis jam en 1961 lia plej amata esperantistino, Marjorie Boulton. Tiaĵojn li ne ebligis nur por siaj samlandanoj – li instruis plurfoje ĉe NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, unuafoje en 2003, kaj okazigis staĝojn pri Esperanto-teatraĵoj en Kvinpetalo dufoje.

Dum jardekoj Paul estis lojala membro de la Universala

Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Asocio de Britio. Por tiu lasta li transprenis en 2001 la redaktoran postenon de *La Brita Esperantisto* de la malsana William Auld, kiu antaŭe la postenon dum kvarona jarcento okupadis. Li celis faciligi la studadon pri Esperanto en Britio al estontecaj historiistoj, kaj tiel starigis la rubrikon *Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?* kaj aldonis biografietajn notojn al ĉiu artikolo.

Sian lastan eldonon li redaktis en printempo 2016, decidinte transdoni la respondecon en novajn manojn. Dum kelkaj jaroj li ne aparte ŝatis la laboron - li taksis ĝin "sendanka laboro" kaj havis la senton post esplora demandado ĉe federacia kunveno, ke homoj ne legas ĝin. Kontribuoj alihomaj estis magraj, venintaj kutime nur el manpleno da fidelaj kolegoj, tiel ke li devis en unu numero verki mem - ĉu vernome, ĉu kaŝnome, ĉu sennome - 31 paĝojn el la 37-paĝa enhavo. En sia unua kuratora kunveno en 2013 li eĉ proponis eldoni nur unu numeron jare anstataŭ la ĝistiamajn du - li estis multe tro okupata por tiel daŭrigi, aparte pro la peza ŝarĝo de dek-unu eldonoj de *Monato* ĉiun jaron.

Li fariĝis en majo 2013 prezidanto de la Esperanto-Asocio de Britio, iom malgraŭ sia unuamomenta malvolemo. Kiam

John Wells enhospitaliĝis trafite de apopleksio en la strato kaj oni ne povis esti certa pri lia posta bonfarto, estis al Paul, kien oni sin turnis, kaze ke John decidus ne plu resti en la rolo. Paul unue sentis sin kontraŭa, citante aparte sian maltrankvilon, ke li estus tiel samtempe redaktoro kaj prezidanto. Sed ankaŭ en tiu respondo troviĝis esperigaj vortoj, ke li plue pripensos. Kaj iom post iom, li adaptiĝis al la ideo, ĝis finfine, post konfirmo de John Wells, ke li preferus ne kandidatiĝi denove, Paul elektiĝis. Pri la rolo li aparte fieris, kaj al postaj kuratoraj kunvenoj li kunportis rideton kaj trovis tempon por leĝeraĵoj inter la plej kutimaj kaj foje tedaj aferoj.

En 2007 Paul elektiĝis al la Akademio de Esperanto, kaj reelektiĝis en 2016. Li estis la direktoro de ĝia sekcio pri literaturo kaj laboris ankaŭ en la sekcioj konsultejo kaj kontrolado de lerniloj. Li intencis povi emeritiĝi kaj tuj poste dediĉi sin kun nova elano al la laboro pri la literatura sekcio. Li ankaŭ partoprenis en la reviziado de la ĉereta kurso Duolingo, do paŝon post paŝo pli adaptiĝis al la virtuala mondo, kiu



*En dormo li mortis,  
surprize kaj pace,  
eble sonĝante pri neverkitaj verkoj.*

*Amiko de plej multaj,  
ĉiam ronde sprita, humurplena,  
kun afabla rideto tutvizaĝe.*

*Mi memoros lin kiel lastfoje,  
kun supra sunĉapelo  
laŭreklame faldebla poŝen  
kaj elfekebla sendifekta  
se elefanto ĝin digestis.*

Jorge Camacho  
Madrido, 8 aŭgusto 2016

estis por li ĝis antaŭ kelkaj jaroj nova tereno.

Malofte en la vivo oni renkontas homojn tiel babilemajn kiel Paul. Ĉiam en la plej flua lingvaĵo li parolis. Sed ne nur. En siaj freŝbakitaj tagoj li pasigis tempon kun eminentuloj de antaŭaj epokoj, ekzemple William Auld kaj Marjorie Boulton, kaj lernis de la majstroj.



Kun ili tri li multe korespondadis letere dum pluraj jaroj.

Kun Bill Auld li pasigis tempon en tavernoj kaj ricevis la kuraĝigon, ke treege plaĉe estis por la spertulo povi paroli en Esperanto kun iu tiel kapabla. Kie Bill estis la onklo, fariĝis la onklino Marjorie. Ĝis sia morto Paul plurfoje en la jaro, foje kun amiko Graham Blakey, vojaĝis al Oxford por viziti Marjorie. Fiere kaj ame li parolis pri ŝi okaze de aranĝo por festi ŝian naŭdekan datrevenon. Kaj fiere ĉe la

evento li staris, la tiama prezidanto de EAB apud la tri antaŭaj (en la foto sube).

Paul estis tre kontenta kun sia vivo. Kun kontenta mieno survizaĝe li lastatempe deklaris, antaŭ ne longe pasiginte tempon kun lernejoj amikoj, ke vere ili estas bonŝancaj esti naskiĝintaj tie kaj tiam.

“Senpaga universitato, dumvivaj laborpostenoj, aĉeteblaj domoj ...” Li tamen konstatis, ke ne ĉiuj homoj havas tiun bonŝancon. Tiel li estis dum kelkaj jaroj kuratoro de karitato, kiu konstruas humanismajn lernejojn en Ugando. Paul mem vizitis la landon por konstati, kiel fartas la projekton. Humanismo estis, kiel

esperantismo, proksima al la koro. (Laŭlitere rilate Esperanton - li ĉiam portis sian verdan stelon sur la brusto.) Paul estis membro de la Brita Humanista Asocio kaj tute ne posedis religian fidon. Li estis politike maldekstrema, kaj kandidatiĝis por la Sociala-Demokrata Alianco en naciaj balotoj en 1983. Li ne venkis: Staffordshire Moorlands apartenas al la konservativa partio, sed li ricevis 12 000 voĉojn, nur 1 000 malpli ol la kandidato de la laborpartio. Li restis progresema, kaj la referendumo decido, ke Britio forlasu la Eŭropan Union, estis por li malĝojiga.

Adoris lin liaj “pacientoj” (lia etikedo por siaj studentoj, “ĉar mi operacias iliajn cerbojn”) ĝis la grado, ke pluraj el ili starigis paĝon ĉe *Facebook* dediĉitan al la “vivanta legendulo”. Aliaj, kompreneble, devis informi Paul pri ĝi, kaj en tiuj tagoj li havis neniun ideon pri tio, kio eĉ estas *Facebook*. Tio devis ŝanĝiĝi, kiam eldonisto petis lin starigi propran konton por varbi siajn verkojn. Kaj ĝin li poste ofte uzis, por dividi personajn pensojn, grumblojn pri misuzita anglalingvaĵo, kaj leterojn al la loka parlamentano.

Paul estis ankaŭ talenta muzikisto. Li ludis klarneton, saksofonon, bekfluton kaj akordionon. Kaj foje li eĉ batis



Paul kun Marjorie Boulton kaj Splodge.

tamburon. Li ludis en pluraj grupoj, inkluzive de la ĵazgrupo *Jazzworks*. Popularan muzikon li tute ne ŝatis, kaj kredis, ke neniu muziko post la 1920-aj jaroj vere estis bona.

Paul pliaĝiĝadis sed plurespekte ne tute plenkreskis. Kio plaĉis al la knabo, plaĉis daŭre al la grizbarbulo. Tiel lia pasio por fervojoj rezultigis ne nur lian iaman malaperon okaze de aranĝo ĉe Shallowford House - kiam grupo ekskursis en la kamparon kaj Paul ekvidis fervojon - sed ankaŭ la ĉeeston de granda modela fervojo en la ĝardeno, kaj unu pli grandioza en la subtegmento. Li eĉ starigis kun najbaro (plia Paul, sed pli alta, do “Paulus Maximus” kaj “Paulus Minimus”) retejon pri *Mossley Light Railway* ([www.mossleylightrailway.co.uk](http://www.mossleylightrailway.co.uk)) kaj aldonis videojn pri ĝi ĉe YouTube ([www.youtube.com/user/doctorswazmack](http://www.youtube.com/user/doctorswazmack)).



Kun Marjorie Boulton dum la brita kongreso de 1989 en Stoke-on-Trent.

Simile rakontebblas pri la angla Laga Distrikto, kie li pasigis multe da tempo infanaĝe kaj tiom multe ĝuis adulte. Tutvive restis kun li la pasio, kiel ankaŭ por aŭtoj de la marko *Mini*. (Kompreneble la lasta ja estis verdkolora kaj havis grandan glumarkon “Esperanto” sur la malantaŭa vitro. Kiel li sukcesis transiĝi en ĝin kaj elen li ne povis klarigi.) Kaj katojn li amis. Ĉiam oni ricevis fotojn de Woody, Pepsi kaj Shirlye. Viskio ankaŭ donis al li plezuron – sed ĉi-foje ne temas pri io el la infanaj jaroj!

Kiel infano antaŭ Kristnasko, foje li ne povis ĝisatendi. Tio montriĝis, ekzemple, kiam Jill fianĉiniĝis. Li tre bone sciis, ke ŝi ankoraŭ ne disdonis la informojn (ja tion agnoskante, kiam li mem faris la taskon per *Facebook*), sed ŝajne li aniĝis al la skolo “pli bone peti pardonon ol permeson”. Same kiam Jill estis graveda – eksciis tutunue ne la amikoj de la filino, sed tiuj de la patro!

Tia li estis ankaŭ tuj antaŭ la

nasko, dirinte al la filino kaj edzino, ke li ne estas tute senzorga kaj devos okupiĝi pri aliaj aferoj. La tagon mem okazis kuratora kunveno de EAB kaj supozeble Paul gvidis la sesion. Komence ĉio iris glate. Sed posttagmeze li decidis, ke sendube salutos baldaŭ la novulo, kaj ĉiam refreŝigadis sian *iPad* por ekscii, ĉu estas jam novaĵoj. Ĉiun kvinan minuton interrompis la parolanton ies voĉo per “Sorry, chaps” kaj levo de la *iPad*, kvazaŭ ĝi kulpus.



Li estis la plej feliĉa viro en la mondo, kiam finfine alvenis la knabo – kiun Jill nomis, je grandega patra plezuro, Edward Paul Gubbins Mason. Altiĝis la plezuro kiam li unuafoje tenis la etulon ... kiu tuj vomis sur la avon. Sed al Paul tio ne ĝenis, kaj li montris al la nepo la apudan fervojon kaj aŭdigis al li (fotite) la poemon de Stanley Holloway *La Leono kaj Alberto* kun la deziro, ke la nove naskiĝinta bebo aŭdu “veran poezion”! Dum personaj momentoj kun Edward, Paul babilis al la infano en



Esperanto: “Birdo! Arbo! Ĉu vi vidas? La birdo estas en la arbo!” Li eĉ komencis rakonti historietojn al li en ilia sekreta lingvo.

Paul tamen dum jaroj suferis pro absoluta manko de libertempo; tiom da aktivajoj kaj devigoj li havis. Li plendis ofte dum almenaŭ du jaroj pri lacego. Dum kelkaj jaroj li provis maldungiĝi de la universitato, kiam pro financaj premoj oni devis malpliigi la nombron de dungitoj. Ĉiam li esperis, sed ĉiam rezultiĝis, ke la universitato preferis konservi la popularajn kaj kapablajn instruistojn, kaj li do ne sukcesis.

*Monato* donis al li grandan ŝarĝon, lia muziko regule postulis tempon, kaj li daŭre verkadis, unue du librojn en la angla (*Laddies and Generalmen*, kaj *Westminster Blues*), kaj lastatempe grandiozan kaj detalan historion pri la esperanta dramo. Pri tiu lasta li celis, ke ĝi estu lia pinta kontribuo super ĉio alia. Sed trovi la tempon profundiĝi en la taskon estis al li neeble. Li raportis bezoni “unuplian vintron” en la lastaj du jaroj. Je sia morto li atingis la jaron 1940, do restis daŭre antaŭ li la plejmulto, tamen. Kaj la plirangiĝo al avo donis al li plian premon, ĉar tiom li volis pasigi tempon kun Edward.

Tial li devis elpreni sin de ie, liberiĝi kaj havigi al si iom da

libereco. Estis logike, ke el EAB li retiriĝu. Li ja estis la motoro de *Monato*, kaj estis la sola homo, kiu povus verki la pridraman verkegon. Sed el EAB estus tute bone, ĉar jam tio havis aliajn motorojn, kaj la perdo ne estus katastrofa, kiel por la aliaj projektoj. Tial li demisiis de siaj roloj en EAB, kvankam ne tute malaperante. Li estus instruinta ĉe la EAB-aranĝo Somerlernejo la semajnfinojn post sia morto.

En somero 2016 li daŭre ne sukcesis aranĝi la sopiritan maldungon kun la universitato, do li mem faris la decidon emeritiĝi por pasigi pli da tempo kun Edward kaj dediĉi sin al la verkata libro. Tragike, li forpasis daŭre relative juna, ne longe antaŭ la planita lasta labortago.

Paul estis multflankulo. Esperantisto, kompreneble, kaj humanisto. Talenta verkisto. Babilema bonkorulo. Eŭropano, eĉ mondĉivitano. Sindonema, eĉ tro. Nia amiko. Amata instruisto. Ĉefe li estis edzo, patro, kaj – plej nove – avo. Kaj, finfine, granda perdo.

Li elektis mem la vortojn por sia tomoŝtono. Demandite prie en intervjuo li respondis, ke li uzos vortojn diritajn de unu sia studento, kiam alia studento ne sciis, kiu estas tiu Gubbins, kies prelegon ili partoprenos: “Paul Gubbins – Esperantisto – La gajulo kun la barbo.” ■

KION signifas al mi mia patro, preskaŭ tro grandas por vortumi. Eĉ kie komenci, mi ne scias.

Unu el miaj plej fruaj memoroj estas sidi en la sino de paĉjo, dum ni kune spektis surbendigojn de la operoj de Gilbert kaj Sullivan. Mi estis tro juna por kapabli aprezi la pli malrapidajn kantojn, sed la rapidajn kaj amuzajn mi ŝategis.

Kio ankoraŭ plibeligis la sperton estis atesti – kaj poste dividi – la tre evidentan plezuron de paĉjo. Li estis pasiplena pri la muziko de Sullivan kaj la tekstoj kaj ideoj de Gilbert. Li havis teorion, ke eblus bazi universitatan kurson sur la operoj kaj tiel sukcese doni al la studentoj vastgaman edukadon. Ni konkurencadis kvize pri rilataj tekstoj kaj banalaĵoj, kaj kunkantis plej laŭte la kanzonojn lavante la manĝilaron. Ni partoprenis ĉiujn Internaciajn Festivalojn de Gilbert kaj Sullivan ĝis ĉi tiu jaro, kaj li admire rigardadis siajn komunajn adeptulojn. Ilin li nomis la Interna Frataro.

Li amis lingvojn. Li studis la germanan, en Germanio iam loĝadis, kaj la lingvon instruis dum pluraj jaroj. Li ankaŭ kapablis altnivele paroli la francan kaj, kompreneble, Esperanton. Li ĉiam bedaŭris, ke al Esperanto li ne

junaĝe alvenis, sed mi opinias ĝuste diri, ke li kompensis poste!

Esperanto kongruis kun tiom multaj el liaj idealoj, pri kunvenigado de homoj kaj ebligado de justa komunikado. Al li treege malplaĉis la ideo, ke la angla estas aŭ estu universala lingvo, kaj li pasie kaj inteligente defendis Esperanton kontraŭ homoj tiom malsaĝaj, ke ili antaŭ li kritikis ĝian celon. Pli ol unu fojon li seninvite parolis al nekonatulo en flughaveno, ĉar li ekvidis verdan stelon kaj tuj entuziasme ekbabilis en Esperanto. Liaj kamaradoj–Esperantistoj estis por li familio.

Pasion fervoran li havis ankaŭ pri trajnoj. En plurajn vapor-lokomotivojn li trenis min – mi ne vere protestis, sed ankaŭ mankis multa entuziasmo. Unu tagon ni staris ĉekaje subpluve kaj mi demandis lin, kial fervoja vojaĝado estas por li tiom alloga. Li fingromontris la relojn kaj deklaris, ke “tiuj reloj povas porti vin en ĉiun angulon de Britio, poste plu en kontinentan Eŭropon, kaj poste en Rusion kaj Azion (se vi ignoras, ke ŝanĝiĝos la larĝo!). Tiuj metalaj objektoj estas konektitaj al la cetero de la mondo.” En tiu momento li montris al mi iom el tio, kio igas fervojojn magiaj.

Dum sia vivo li estis instruisto - ne nur al siaj studentoj, sed ankaŭ al mi, ĉiun tagon, pri ĉiaj etaj aferoj. Li instruis al mi rajdi sur biciklo, helpis al mi pri hejmtaskoj, kaj montris amuziĝi milmaniere.

Ĉiuj havis karesnomon, eĉ plurajn. Mi estis *Haystacks* ("Fojnamaso") pro mia infanaĝe senorda blonda hararo. Panjo estis *Frog* ("Rano"), ĉar ŝi unufoje surhavis verdan robon, kiu liatakse aspektigis ŝin rane. Antaŭ familia tosto ĉiam aŭdiĝis "je via rano". Certaj demandoj ĉiam ricevis stultajn respondojn. Demandu la horon (anglalingve "kio estas la horo?" kaj samvorte "kio estas la tempo?"): ricevu senescepte respondon sensencan en malbona imito de sciencisto, kiu difinas la signifon de la vorto *tempo*, kaj ne la aktualan horon.

Kiam mi kaj mia frato estis infanoj kaj ludis en la strato kun la najbaroj, ĉiuj opiniis paĉjon tre amuza. Ofte li aperis tra dormĉambra fenestro kun ranpupo sur unu mano kaj ĝirafpupo sur la alia, kaj babilis kun la subaj infanoj. Li iam gastigis lernejan ekskurson en nian subtegmenton, por ke miaj samklasanoj vidu lian modelan fervojon. Miaj tiamaj amikoj daŭre memoras tiun ekskurson.

Li aperadis al festoj kun rano surŝultre sen menciigi ĝin, ĝis tion faris aliulo - kaj tiam ŝajnis

indignon, ke iu povus pensi tion stranga. Je la finiĝo de la festo ĉiam probablis, ke pluraj aliaj homoj ankaŭ surhavas ranon - li kapablis bele tiri homojn en lian amuzadon kaj sensencadon.

Unu afero, pri kiu mi estas plej dankema estas, ke paĉjo renkontis mian filon, Edward, naskiĝintan lastjare. Li volis esti konata kiel "Gramps", ĉar lia propra Gramps ("avĉjo") tiom signifis al li. La tagon, en kiu Edward naskiĝis, venis paĉjo al la hospitalo. Li kantis por li Gilbert kaj Sullivan, rakontis sian plej ŝatatan lankaŝiran poemon (*The Lion and Albert*), kaj montris al li fervojon tra la fenestro. Panjo diras, ke la aferoj ripetiĝas, kaj ke li agis same, kiam mi kaj mia frato naskiĝis.

Kun la novenaskiĝinta Edward paĉjo pasigis tempon, dum mi ripozis. Li instruadis Esperanton dum promene. Julion ni feriumis kaj Edward ekbabiladis - lia unua vorto estis *cat* ("kato"), ja taŭge por nia familio! Paĉjo tiom ĝojis atesti la lingvan evoluadon. Por mi, tio estas la plej trista afero, ke ni perdis paĉjon tiom juna - Edward ne memoros sian brilan Gramps.

Malgraŭ tio, mi opinias min bonŝanca - bonŝanca, ke li estis mia patro, kaj ke mi povis kun li pasigi tiom da tempo. Sed lian mankon mi sentas, pli ol vortesprimi mi kapablas. ■

# Ni kondolencas

MI havas la malgajan devon sendi al la familianoj kaj la intima rondo de Paul Gubbins la kondolencojn de la Akademio de Esperanto, kiu estis fiera havi lin en siaj vicoj jam ekde 2007. En la Akademio, Paul estis ĝis sia forpaso la direktoro de la Sekcio pri Literaturo kaj laboris ankaŭ en la Konsultejo kaj la sekcio pri Kontrolado de Lerniloj.

Lerninte Esperanton kiel laboranta plenkreskulo, Paul akute perceptis la bezonojn de tiaj lernantoj. Li krome estis escepte dotita sur la teatra tereno: li verkis plurajn pintajn dramojn kaj estis la plej elĉerpa elspuranto de la originalaj teatraĵoj en nia lingvo. Tial li insiste lokis en la plenkreskula vivo la viglajn konversaciojn en siaj sukcesaj kaj abunde laŭditaj lernolibroj de Esperanto.

Fizike maleblas listigi por vi la serion da teatraĵoj, lernolibroj, aŭdvidaj lerniloj, kiujn Paul verkis, kunkreis, reviziis, plej laste la lernilaron de Duolingo. Daŭrus tro longe eĉ nur listigi la premiojn ricevatajn de li. Li portis ĉi tiun kronon ege modeste. Tiu modesto ebligis al Paul modelan stilon de instruado. Mi mem persone spertis lian stilon en Torino, kiel lernanto en lia kurseto pri la Esperanta

teatro. Paul tute flue gvidis nian kolektivian laŭtleĝadon de la dramoj, forgesigante la nivelan malegalecon inter la partoprenantoj.

Li krome elpaŝis el niaj kutimaj podioj kaj premis surprizajn klavojn. Aparte menciindas lia antologio de originalaj Esperantaj beletraĵoj kun angligoj, *Star in a Night Sky*. En sia rolo de ĉefredaktoro de *Monato*, Paul ĉi-jare helpis efikege fajli kaj reliefigi raporton pri temo draste malatentata en la ĉefaj amaskomunikiloj de la mondo – la atencoj kontraŭ dalitoj (aŭ ‘parioj’) en Barato. Nia samakademiano Giridhar Rao kaj multaj ekster-Esperantaj agantoj por la rajtoj de dalitoj en Barato aprezis ĉi tiun kontribuon de Paul. Ankaŭ ili petis min komuniki al vi tutkorajn kondolencojn pro la subita forpaso de eksterulo, en kiu ili trovis samideanon kaj kun kiu ili esperis daŭrigi la konversacion. Ni devos daŭrigi plurajn entuziasmajn konversaciojn lanĉitajn de Paul Gubbins por akiri la rajton vere omaĝi al li. Mi ne sukcesas kredi, ke ni meritis lin. Mi ne scias, kiavorte konsoli vin, aŭ min mem.

**Probal Dasgupta,**  
**prezidanto, Akademio de Esperanto**

PAUL, vi restos stelo en nia nokta ĉielo, kiu foriris ho tro frue al alia parto de la kosmo.

**John kaj Christine Murray**

KARA Jill, estas granda bato perdi amatan patron, multe pli granda por vi pro lia relative juna aĝo kaj pro subiteco. Mi esperas, ke Edward memoros iom pri sia avo kaj scias, ke ankaŭ li malprofitos de nuna malapero de sia avo en la vivo.

**Heleno Fantom**

PAŬLO, vi tiom faras por Esperanto, ankau por mi. Vi donis al mi la okazon prelegi kaj verki en Esperanto. Mi krome transdonas kondolencojn de Girvan kaj Maire Mackay. Ni ĉiuj ege bedaŭras vian tro fruan forpason.

**Jack Warren**

ESTIS tre granda ŝoko subite ricevi la informojn pri la tro frua kaj tute neatendita morto de Paul Gubbins. La ĉefa penso, kiu tuj venis al mia menso, estis, ke li estis ege kara kaj aminda homo.

Mi kunlaboris kun li en kelkaj okazoj, kaj se ekzemple necesis gvidi laborgrupon mi rimarkis, ke li ĉiam konscias pri la bezonoj de la partoprenantoj, kaj scias kiel aktivigi ilin, por ke ĉiuj povu laŭeble kontribui. En la Akademio de Esperanto ni plenumis grandan taskon lastatempe por kontroli la novan retan kurson de Duolingo,

kaj liaj kontribuoj estis ĉiam akurataj, utilaj kaj tre helpaj por la laboro.

Mi sendas miajn tre sincerajn kondolencojn al liaj familianoj. Mi ĝojas, ke li almenaŭ havis tempon por konatiĝi kun sia nepo, pri kiu li tiom fieris. Mi tre bedaŭras, ke li perdis tiom da jaroj, kiujn li estus devinta ĝui kune kun sia nepo kaj aliaj familianoj.

**Anna Löwenstein**

JAM pli ol 20 jaroj mi konis Paul. Mi profunde sentas la perdon de tiom afabla, tiom sprita, tiom amika samideano. Britaj kaj universalaj kongresoj ĉiam pliboniĝis kaj pliamuziĝis pro lia partopreno: li havis tian talenton bele prelegi kaj samtempe klerigi la aŭdantaron. Ankaŭ mankos al mi liaj tekstoj, ĉu redaktoraj komentoj, ĉu dram-verkoj, ĉu anglalingvaj verkoj.

**Geoffrey Greatrex**

WE will all miss Paul so much. He had a genius for writing plays and for teaching – but also for making friends and having fun.

**Elizabeth Stanley**

I HAVE fond memories of Paul's entertaining wit and wisdom, and of the occasions I have spent with him over the years, discussing how to put the world to rights. Gone too soon. I will miss him.

**Ed Robertson** ■

# Journey into Esperanto

Kat Newbould

THIS is my second visit to the scenic village of Barlaston, home to Esperanto House, base of the Esperanto Association of Britain (EAB) and its Butler Library, which houses an impressive collection of literature from across the world and translated into Esperanto, as well as a bookshop used to sell new material and second-hand books.

The course *Lernu Plu* means “keep on learning”, and is pitched as a next step up for beginners – you’re assumed to know the word for “hello” and be able to use both past and future tense in conversation.

The instructors are friendly and the day starts with Viv, the administrator and caretaker-in-chief of Esperanto House, supplying everyone with hot or cold drinks, and making sure there are enough paper and pens for everyone. Every participant in the course has a name badge, including the teachers, so being bad with names is no excuse not to come and experience the wonderful hospitality of Esperanto House.

The day starts with some basic conversation. One of my fellow students has been to a *Lernu Plu* before, though I’m under the impression at the time that *several*



Alina Mironova kaj Kat Newbould,  
novaj membroj de EAB.

have, so I initially feel very out of my depth. However, the instructors Tim and Ian step in and help unravel my tongue, and after a few hour-long lessons and several tea breaks, I’m feeling comfortable with Esperanto again. Not bad for only my second time in this environment!

The lessons consist of working through poems and songs, as well as a discussion of the meaning behind them and grammar points – these are mostly humorous or of historical value, and remain interesting throughout. Videos are also used to underline grammatical

points, and just before the end of the day there's a full-blown presentation in Esperanto about one of the leading Britons when the language was first becoming popular in the UK. The presentation is given wholly in Esperanto and I'm able to follow along and understand roughly 80% of the words used. Where I don't understand, the instructor already seems to know that the sentence is tricky and

En aprilo kaj julio okazis en Barlastono sesioj de la kursaro *Lernu* kaj *Lernu Plu*. La kurso senkostas kaj donas al la studentoj 9-10 horojn da studado.

Unu el la studentoj, **Kat Newbould**, eklernis Esperanton pere de Duolingo. Ekde tiam ŝi ĉeestis unu sesion de *Lernu* kaj alian de *Lernu Plu*, kaj ankaŭ partoprenis kurson en Greziljono.

Ni publikigas ŝian resumon de la aranĝoj esceptokaze en la angla, por pli faciligi la komprenon por tutaj novuloj, kiuj eble legos tiun artikolon, kaj por espereble kuraĝigi ankaŭ ilin partopreni venontan sesion.

Okazos plia senpaga sesio de *Lernu/Lernu Plu* en Barlaston la 15-an kaj 16-an de oktobro. Se vi interesiĝas partopreni kaj sperti mem, vi povas legi pli pri la kursoj kaj mendi vian lokon ĉe [esperanto.org.uk/events/lernu](http://esperanto.org.uk/events/lernu).



Partoprenantoj de *Lernu* kaj *Lernu Plu* en aprilo, de maldekstre: Stephen Picksley, Christabel Godlewska, Malcolm Jones, Kelly Payne, Andy Pepperdine, Ian Carter, Pete Cookson, Martin S Taylor (surgenuo), Anthony Bodineau, Tom Roche, Matthew Roche, Jack Edwards (surgenuo), Dave Sumpter.



Partoprenantoj en julio, de maldekstre:

Stephanie Arteaga, Marcus Richardson, Kat Newbould, Ian Carter, Simon Whiteley, Christopher Lewis, Malcolm Jones, Jack Edwards, Adam Hall, Saira Hall, Scott Berry, Catherine Sarquis, Alina Mironova. Ĉeestis pluraj aliaj kiuj ne troviĝis en la foto.

automatically rephrases the Esperanto so that I can pick up the meaning.

The first day wraps up with a nice pub steak dinner (there are vegetarian options available) and a lengthy chat with my fellow students and instructors about the future of Esperanto in Britain and across the world, as well as other more mundane, everyday topics of conversation.

The second day (from 10am to roughly 2pm) is spent mainly in discussions of finer points of

grammar, to answer questions raised throughout the first day, and with another presentation given in Esperanto. A group photograph is also taken to commemorate the first time many of us have met. The library and bookshop is explored again, and all learners receive free dictionaries and mugs.

All in all, a perfect pair of courses for a beginner - *Lernu* introduces you to the language and grammar, while *Lernu Plu* expands on these, allowing you to drill a little deeper into both the grammar



## Jam la cent-unua

LA 101-a Universala Kongreso de Esperanto sukcese okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2016 en la urbo Nitro en Slovakio. Aliĝis 1253 homoj el 58 landoj. Partoprenis 27 homoj el Britio, inkluzive de Harry



Barron ◀ kaj Hilary Chapman ▲, kies fotoj troviĝas apude. Spektemuloj ĝuos filmeton pri la kongreso ĉe [lbesp.org/uk-nitro](http://lbesp.org/uk-nitro).

La 102-a Universala Kongreso okazos en Seŭlo, Sud-Koreio. Aliĝo eblas ĉe [uea.org/kongresoj/alighilo](http://uea.org/kongresoj/alighilo). ■

and the history of Esperanto. Because of the way they work together, I would advise any *komencanto* (beginner) to first attend a *Lernu* session, even if your grammar and understanding are already very good. Even though *Lernu* is aimed at complete beginners, many *komencantoj* have never spoken Esperanto before, even if they have practised using Duolingo.

After completing both a *Lernu* and a *Lernu Plu*, you will have covered

most of the grammar points in the *Teach Yourself Esperanto* book and, with the help of the tutors and fellow students, will be well equipped to continue your journey into Esperanto and its world.

Big shout-out to Tim, Viv, Ian and Malcolm for maintaining Esperanto House in Barlaston as a helpful, hospitable place where all are welcome to come and explore this fabulous language! ■

More info at [esperanto.org.uk/events/lernu](http://esperanto.org.uk/events/lernu).

ĈE la Universala Kongreso en Nitro mi ĝojegis, kiam la estro de la slovaka poŝta servo anoncis, ke la lando eldonas novan poŝtmarkon memorfestante Esperanton kiel ilon por internacia komunikado.

Mi tuj poste renkontis tiun estron kaj la fasoniston de la poŝtmarko kaj gratulis ilin pri la apero de nova Esperanto-poŝtmarko. Je mia granda surprizo, la estro de la slovaka servo serĉis en sia teko, kaj prezentis al mi donace malhelan kartan dosierujon, kiu enhavas kaj specimenan poŝtmarkon kaj stampitan memorkoverton. ■



Tute freŝa pentraĵo, kiu aperis antaŭ la gastejo de Harry Barron dumsemajne en Nitro.

## Jubilean gratulon!



GRATULON al Terry kaj Anica Page, kiuj festas kvindek jarojn da geedzeco. Ili unuafoje renkontiĝis ĉe la ĉefstacidomo en Amsterdamo en 1964, antaŭ la tiujara Internacia Junulara Kongreso. Terry estis tiam membro de Junularo Esperantista Brita.

La geedziĝo okazis la 23-an de julio 1966, kaj Anica, kiu apenaŭ tiam scipovis la anglan, transloĝiĝis el Slovenio. La hejma lingvo kompreneble estis Esperanto.

Kvindek jarojn poste ili festas sian jubileon. Kaj la tiama novelzino daŭre belas. Korajn gratulojn al ili! ■

## Nova redaktoro?

DUM 25 jaroj redaktis *La Britan Esperantiston* William Auld. Lin sekvis dum 15 jaroj Paul Gubbins.

La antaŭuloj estis ja diligentaj kaj talentaj, sed ne eternaj. *La Brita Esperantisto*, starigita en 1905, bezonas novan redaktoron por pluvivi estontecen. Se vi interesiĝas pri la rolo, bonvolu kontakti aŭ Tim Owen [tim.owen@esperanto.org.uk](mailto:tim.owen@esperanto.org.uk) aŭ Ian Carter [ian.carter@esperanto.org.uk](mailto:ian.carter@esperanto.org.uk). ■

La Brita Esperantisto

Numero 882  
Printempo 2017

Ĉu VI povus esti la nova redaktoro?  
Kontaktu nin se vi interesiĝas pri la rolo

# La mirinda mondo de muzikinstrumentoj

Andreo Marshall

UNU el la plej interesaj eventoj en la kadro de la pasintjara kongreso en Lillo estis “La mirinda mondo de muzikinstrumentoj”. Temis pri ekspozicio de la plej diversaj muzikiloj el la grandega kolekto de franco Hervé Gonin. Tiu okazis je ioma promeno for de la kongresejo kaj eble pro tio ne tiom da homoj ĉeestis.

Tamen, kiam mi vizitis, malgraŭ tio, ke ni estis entute nur kvar ĉeestantoj, s-ro Gonin entuziasme kaj plendetale klarigis pri ĉiuj instrumentoj senpaŭze dum 2 horoj kaj 15 minutoj. Ne nur tio - li povis muzikumi sur preskaŭ ĉiuj!

Ni povis sperti la evoluon de muziko pere de ties instrumentoj. En la komenco estis muzikilo el ĉevala makzelo:



Poste ni miris pri muzika poto.



Por ludigi ĝin, oni metas ian bekfluton en la poton kaj tenas ĝin tra la flankaj truoj. La poto funkcias kiel sonkesto kaj plilaŭtigas la sonon.

Dum ni rondiris la ĉambron, la instrumentoj fariĝis pli kaj pli mirindaj. Jen tamburo por unubraka tamburisto! Oni turnas la anson por funkciigi la bastonojn:



Pli interesaj por mi estis la kordinstrumentoj, ĉar mi estas ludanto de ĉiuj orkestraj arĉinstrumentoj. Unue ni povis vidi kaj aŭskulti la liuton kaj iun ĉinan

instrumenton ►, kies nomon mi bedaŭrinde ne kaptis:



Poste sekvis la hinda sitaro kaj ia arĉositaro, kiun Hervé ludis per ne tiom aŭtentika violonĉela arĉo!



Mi ĝojis vidi mez-orientan hoboĵon, kiu similis al tiu, kiun mi mem aĉetis en Tunizio antaŭ multaj jaroj: tre laŭta instrumento, kiun oni ludis ekster nia dormoĉambra fenestro meznokte por festi ies geedziĝon, mi memoras! Pro la



seka anĉo, Hervé ne povis sonigi tiun hoboĵon ▲. Almenaŭ mi ne bedaŭris.

Estis nur dekono de la kolekto de Hervé Gonin en Lillo. Li havas ĉirkaŭ 600 instrumentojn hejme!

Mi aldonu unu nekonatan fakton pri Hervé. Li ne nur respondecas pri sia mirinda kolekto – li estas ankaŭ la brila tradukinto de la Asteriks-libroj en Esperanton! ■



Mikaelo Sims, Malcolm Jones (apenaŭ videbla malantaŭ Mikaelo!), Kelly Payne, Stephen Picksley, Andy Pepperdine, Anthony Bodineau, Adam Hall, Damon Lord, Jack Edwards, Sam Poynter, Joan Butler, Jack Warren.

DUM pli ol 50 jaroj okazas somera kurso de EAB. Dum la unuaj 40 jaroj ĝi nomiĝis Somerlernejo: aranĝo, kiun starigis Marjorie Boulton kaj kiun poste gvidis Paul Gubbins.

Antaŭ jardeko la nomo ŝanĝiĝis al Somera Festivalo, sed ĝi restis tia, kia ĝi ĉiam estis; kvintaga tranokta kurso. Ĉi-jare io ŝanĝiĝis, pro plurjara falo en la partopren-antara cifero kaj do kosto al EAB, kiu devis garantii certan nombron de pagitoj. Unue ĝi moviĝis de kvin labortagoj ĝis semajnfino, de Shallowford House al Esperanto House, kaj de plurcentpunda por ĉiu persono al senpaga. Due, ni revenis al ĝia tradicia nomo.

La unuan novan Somerlernejon gastigis Barlastono la 13-an kaj 14-an de aŭgusto. Jack Warren

gvidis la progresantojn.

Paul Gubbins, la plej avida subtenanto de la aranĝo, kiam li estis kuratoro kaj tiom antaŭĝuante la novan version, estintus la instruanto de la progresinta kurso. Malcolm Jones heroe voluntulis gvidi la grupon de Paŭlo en la tagoj tuj antaŭ ĝia okazo.

Somerlernejo estis sukcesa. Unue la nombro de partoprenantoj obliĝis, post la ses en 2015. Due, la plejmulto de la partoprenantoj en la progresanta grupo estis novuloj, kiuj alvenis gustuminte unue nian serion *Lernu Plu*. Vi legos apude raportojn verkitajn de du el la lernintoj, po unu por ĉiu grupo.

Dankon al Jack, Malcolm kaj Viv pro ties helpo, precipe en malfacila situacio post la morto de nia amiko, Paul. ■

**KP** MEZE de aŭgusto mi ĉeestis la Somerlernejon 2016 ĉe Esperanto-Domo en Barlastono. Mi ekkomencis lerni Esperanton dum kristnasko – mi ŝategas kapti ĉiun okazon por ekzerci min. Mia kuraĝa edzo diris, ke li prizorgos miajn kvin infanojn, do mi ne hezitis aliĝi. Mi konis la vojon, ĉar mi ĉeestis *Lernu Plu* en aprilo, kaj post preskaŭ du horoj veturilo, mi alvenis.

Mi aliĝis al la progresanta grupo, kun ses aliaj homoj. Jack Warren estis la instruisto, kaj liaj jaroj da sperto estis evidentaj. Utiligante multajn temojn, li gvidis nin tra amaso da vortoj kaj gramatikaj ekzercoj.

La lecionoj estis bonegaj, sed oni devas ne subtaksi la valoron ankaŭ de la kafpaŭzoj. Dum la kafpaŭzoj ni povis interparoli kune – ni ekkonis unu la alian kaj ankaŭ havis la ŝancon enmeti la frazojn,

pri kiuj ĉiu komencanto sentas sin sekura. Ekzemple “Kiel vi nomiĝas?”, “De kie vi estas?” kaj “Kiel vi fartas?”.

Alia bonega aspekto de la semajnfino estis la libroaĉetejo! Iu ajn, kiu konas min, scias, ke mi ŝategas aĉeti librojn. Kaj ĉi tie ĉe Esperanto-Domo mi trovis trezorejon! Ankaŭ ne forgesu la devigan komunan fotadon, apud la steloforma monumento.

Post tago plena je aktivaĵoj ni iris (kun la progresinta grupo) al la trinkejo *Plume of Feathers* (Plumtufo), por vespermanĝo. Tiu fakto ĝojigis mian filon, ĉar tie troviĝas “PokeStop” por la poŝtelefona ludo *Pokémon GO*. Sed mi trovis nur oftajn monstrojn.

Dum vespermanĝo la interparolado daŭris – Esperante kompreneble, sed kun nur sufiĉa kvanto de la angla por ebligi babiladon pli facilan (por ni

komencantoj – precipe post biero aŭ vino!). La manĝo estis mirindega! Eble la plej granda miraklo estis la fakto, ke ni ĉiuj ricevis ĝuste niajn antaŭmenditajn manĝojn. Dankon al Viv, kiu preparis liston anticipe, por savi nin el nia forgesemo. Kiam deserto estis servita, ni levis nian glasojn memore al Paul

En la kristnaska periodo de 2015, dum ŝi serĉis ĉe YouTube konsilojn por instrui lingvoakiran kapablon al infanoj, **Kelly Payne** trovis la prian TEDx-prelegon de Tim Morley.

Estinte adeptulo de la komedio *Red Dwarf*, ŝi rekonis la nomon de Esperanto kaj do kontaktis EAB kaj rapide kompletigis la senkoston poŝtan kurson, sub la lerta instruado de Malcolm Jones.

Ŝi poste ĉeestis la Britan Kongreson en Liverpolo, la kursojn *Lernu* kaj *Lernu Plu*, Somerlernejon, kaj eĉ aliĝis al la Drondo en Londono kaj novembro kunveno de Junularo Esperantista Brita!

Gubbins. Kaj Malcolm rakontis pri sia amikeco.

Post nokto en diversaj lokoj, ni rekunvenis por la lecionoj de dimanĉa mateno. Estas kelkaj aferoj, kiujn oni ne povas lerni per nur libroj – kaj semajnfino ĉe Esperanto-Domo estas precize tio, kion ĉiu progresanta aŭ progresinta esperantisto bezonas. La eblo liberiĝi de la angla, kaj aŭdi nin uzi Esperanton estis emocia.

Kiam mi povos aliĝi plian fojon?

**DL** KVANKAM mi lernis Esperanton antaŭ ol dudek jaroj, ĝis nun mi fakte ne ofte ĉeestas renkontiĝojn. Pro tia preteratento, mi decidis iri al la ĉi-jara somerlernejo en Barlaston. Per tremantaj kruroj, mi alproksimiĝis al la domo. La ŝildo deklamis, ke mi atingis la ĝustan lokon: Esperanto House. Mian unuan fojon ĉe Barlaston, mi iom timis, ke mi ekdronos sub ondo de vortoj nekomprenataj.

Subite malfermis la pordon nia instruisto por la progresintaj studentoj, Malcolm Jones, kun gaja sunluma “Saluton!” Mi tuj eksciis, ke mi ne plu sentos teruron internan, sed anstataŭe ekkomencis feliĉegan semajnfino studan.

Kun inda tosto al la memoro de Paul Gubbins, la vespera manĝado pasis

agrable ĉe loka trinkejo, kiun posedas la brita aktoro Neil Morrissey. Se ni malkovris nur unu novan lernendan fakton ĉe la trinkejo, estis, ke “bovinoj muĝas”. Tion lernis ni ridante, per kanto.

La amikeco kaj teo fluis libere, interrompitaj per studtempoj profundaj. Ni kunvojaĝis tra temoj poeziaj, literaturaj, kulturaj, historiaj, politikaj, kaj ĉiam amuzaj kaj viglaj. Ni sentis sin tute hejmaj, inter amikoj esperantistaj. Preskaŭ neniaj anglaj vortoj eskapis el la buŝoj de la ĉeestantoj.

Per la gvidado de Malcolm Jones kaj Jack Warren, la lernado estis sufiĉe taŭga, kaj kompreneble limpuŝis bone la nivelon de ĉies kapablo. Tie vizito al la Butler-Biblioteko certe ankaŭ necesis, kaj mi trafolumis librojn por flanka esplora historia projekto, kiu parte inspiris mian ĉeeston.

Finfine *jam temp' estí*, kaj ni devis foriri, sed ne sen vizito al la enoficeja butikoj por aĉeti multajn novajn librojn kaj forpreni multajn brokantajn tekstojn. Ni ne adiaŭis sed nur ĝisis, kaj sciis kore, ke ni ja en Esperantujo renkontos, ie, iam, baldaŭ. ■

**Damon Lord** lernis Esperanton en 1996 kaj helpis organizi la Britan Kongreson en 1999. Kimro, li nun loĝas en Anglio kun siaj edzino kaj filo. Li reesperantistiĝis en 2010, kaj revigliĝis pasintjare en Esperantujo, dank' al Duolingo.



LA pasintan 4-an de junio okazis apud la kunvenejo de la Londona Esperanto-Klubo sesio de la oficiale rekonata ekzameno de la Komuna Eŭropa Referenckadro. EAB per grandanima oferto repagi la ekzamen-kostojn de eventualaj sukcesaj rezultoj ebligis atingi bonan kvanton da kandidatoj.

En la nivelo B1 partoprenis Christopher Lewis, Sam Bull kaj Diana Robin, en la nivelo B2 estis Mike Taverne kaj Maria Paola Fortuna. Neil Roberts, Matt Peperell, Oleksandra Kovyazina kaj Magnus Henoch alfrontis la superan nivelon C1.

La kandidatoj ne venis nur de Londono, sed ankaŭ el Brighton, Bristol kaj Hertford. Surlokaj organizantoj estis Marteno Miniĥ kaj Renato Corsetti. Ekzamenantoj de malproksimo estis Katalin Kováts kaj Márta Kovács.

Salutis la partoprenantojn John Wells, kiel supera Esperanto-eminentulo en Londono, kaj iom surprize ĝojige la nova urbestro de London, Sadiq Khan.

La rezultoj estis tre pozitivaj, ĉar ĉiu kandidato sukcesis en sia

ekzameno kaj tiel invitiĝis al speciala ceremonia vespero ĉe la Londona Klubo por ricevi sian diplomon.

Pro ĉi tiu unua KER-ekzameno en Britujo ĉiuj britaj esperantistoj estas invitataj jam nun partopreni la venontjaran ekzamenon. Ĝi donas ateston leĝe validan tra la



Ricevas siajn diplomojn Magnus Henoch, Oleksandra Kovyazina, Matt Peperell, Christopher Lewis kaj Diana Robin apud la organizanto, Renato Corsetti.

tuta Eŭropo.

Via laborestro, lernejestro, kaj similaj devas agnoski ĝin kiel ateston de kono de Esperanto je difinita nivelo. Ke ĝi konvinkos ankaŭ vian bopatrinon pri la seriozeco de Esperanto, ni ne povas certi. ■

HAROLD Bolingbroke Mudie naskiĝis la 30-an de januaro 1880, la sola infano de Alfred kaj Ann Mudie. Lia patro estis ano de la bibliotekista firmao *Mudie's Library*, kaj la patrino – tiam Ann Bolingbroke antaŭ la edziniĝo – perlaboris sian vivon kantante.

Edukiĝis la juna Harold unue en privata lernejo en Handsworth, kaj poste plurajn pliajn jarojn en Folkestone. Por rehavigi al la familia domo la ĉarman junulon, la gepatroj poste studigis lin ĉe University College School en Londono, kaj gajninte subvenciojn li poste studadis ĉe London University.



Enkondukis Paul Gubbins en sia unua numero la rubrikon *Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?*

Li ĉiam celis doni al venontaj Esperantistoj scion pri tio, kiuj ni hodiaŭ estas, kaj ankaŭ videbligi la nunajn homojn al ni mem.

Ni konservos tiun tradicion, sed ankaŭ kunfandos tiujn du celojn.

Per la nova rubriko *Kiu kiuis?*, ni instruos al ni pri tio, kiuj ni pasintecce estis. La unua homo en tiu rubriko estas la viro, kiun la verkinto taksas la pinta pioniro de la Esperanto-movado en Britio:

**Harold Bolingbroke Mudie.**

Li ne finfinis siajn universitatajn studojn, ĉar, dum li estis studento, li ricevis laborproponon de C.J. Whittington & Co., fama borsista firmao. Ĝin li akceptis, kaj tiel komencis sian vivon borsistan. Li sukcese adaptiĝis al la posteno, tiel ke li en 1905 starigis sian propran firmaon, al kiu aniĝis en 1906 R.C. Traget. Tiel sukcesa li estis, fakte, ke antaŭ la ekmilitiĝo en Eŭropo kaj nur en siaj tridekaj jaroj li pensis retiriĝi de la laboro kaj dediĉi sin al internacia vojaĝado kaj samtempa varbado por Esperanto.

Lia kolekto de poŝtkartoj, biletoj kaj fotoj el landoj, kiujn li vizitadis

en la unua jardeko de la dudeka jarcento, inkluzivas diversajn landojn kiel Montenegron, Hispanion, Svedion kaj Rumanion. Ĉiam en la fotoj oni vidas lian ĉiean Esperanto-flagon. Li do vole-nevole fariĝis la unua Esperanto-turisto.

### *Esperanto en Britio*

Mudie jam sufiĉe bone regis plurajn lingvojn, kiam li unue renkontis Esperanton en oktobro 1902, post pria artikolo en la fama *Review of Reviews* de W.T. Stead. Li estis unu el la fondintoj de la Londona Esperanto-Klubo, estinte unu el la kvin homoj, kiuj regule kunvenis ĉe la domo de d-ro J.C. O'Connor por ekzerci sin en Esperanto. Jam aprilon li fariĝis la kluba sekretario. Tio estas nur la deirpunkto de lia aktivado por la lingvo.

Iam tiutempe Stead petis al Mudie publikigi novan gazeton en Esperanto. Ne nur tamen lanĉi ĝin, sed ankaŭ esti ĝia sola redaktoro: “Mi kredas je komitato de unu sola, kaj vi estas tiu unu.”

Mudie ne certis, ĉu akcepti tiun proponon pro la financa risko, se ĝi ne sukcesus, sed tiun problemon solvis Stead per propono esti garantianto, kaj do en kunveno de la Londona Klubo la 20-an de julio 1903 konkretiĝis decido starigi novan gazeton, kiun dum unu jaro Stead finance subtenos. Tiel en



novembro 1903 naskiĝis *The Esperantist*, 16-paĝa monata gazeto. Konsiderindas, ke Mudie nur 23-jaraĝis tiam kaj Esperanton lernadis nur dum proksimume unu jaro!

Je la fino de la unua jaro Mudie povis raporti al Stead, ne nur ke la gazeto ja sukcesis rilate enhavon, sed ankaŭ ke ĝi rikoltis belan profiton. Miris Stead: “Multfojojn mi estis garantianto, sed jen por la unua fojo mi ne estas devigata elpagi monon.”

Mudie redaktis *The Esperantist* dum 26 eldonoj, antaŭ ol ĝi kunfandiĝis kun *The British Esperantist*, la gazeto de la intertempe starigita *British Esperanto Association*, en januaro 1906, kaj Mudie fariĝis unu el la anoj de ĝia redaktora komitato. Pli ol 100 jarojn kaj preskaŭ 1000 eldonojn poste, ĝi daŭre eldoniĝas.


## Etendo de liaj horizontoj

Mudie troviĝis ankaŭ en 1904 inter la internaciaj pioniroj. La plimulto da homoj kun iom da scio pri Esperanto scias, ke la unua Internacia Esperantista Kongreso (en postaj jaroj Universalaj Kongresoj) okazis en Bulonjo-ĉe-maro en 1905.

Nesciate ĝenerale tamen estas, ke tiu ne estis la unua tia kunveno; en aŭgusto la antaŭan jaron grupo da Esperantistoj ĉefe el Britio kaj Francio kunvenis en Dovero kaj Kalezo, kaj la sukceso de tiu aranĝo estis tio, kio puŝis Alfred Michaux, mem partoprenante, inviti ĉiujn al Bulonjo. Mudie, kompreneble, partoprenis ankaŭ tie.

Théophile Cart, en sia parolado ĉe la aranĝo, priskribas “la redaktoron de *The Esperantist*” kiel “altan blondan junan viron, kun grandaj okulvitroj kaj elrazita vizaĝo, parolante per dolĉa kaj ia Angla akcento, tiel bela en Esperanto, kiam ĝi ne estas forta”.

Paul Boulet ankaŭ rimarkis la ĉeeston de Mudie; al li falis la tasko organizi teatran prezenton *Edziĝo Kontraŭvola*, traduko de *Le Mariage forcé* de Molière, kaj tion li faradis subpreme. Post disputo kun Victor Dufeutrel, la tradukinto, li ricevis



Pollen, Cunningham kaj Mudie.

la manuskripton nur 15 tagojn antaŭ la malfermo de la kongreso kaj devis rapide trovi ludantaron. Mudie estis la lasta, kiu alvenis al la ekzerciĝo la sabaton, promesinte al Boulet la antaŭan vesperon, ke li jam ĉion ellernis.

Mudie partoprenis la duan internacian kongreson – ĉi-foje duoble pli populara pro la 1200 ĉeestantoj – en Ĝenevo, kiu uziĝis kiel preparilo por lia plej granda tiutempa kontribuo; la unua kongreso venis al Britio en 1907, kaj Mudie, kune kun d-ro George Cunningham, dentisto, kaj Kolonelo John Pollen, prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, estis unu el la “Trio por la Tria”.

En la vero Mudie estis la ĉefa organizanto kaj ricevis laŭdadon pro sia tre efika organizado, inkluzive de tio, ke li trovis loĝadon kun esperantistaj familioj por transmaraj vizitantoj, kaj aranĝis tablojn tiel, ke neniu sidis apud

samlingvanoj, tiel devigante la kongresanojn uzi Esperanton.

En 1908 Esperantujo postvivis traŭmatan skismon, en kiu eble unu kvarono de ĝiaj altranguloj (tamen relative malmultaj normalaj Esperantistoj) forlasis la movadon pro prefero al alternativa planlingvo, kiu estis nenio pli ol reformita Esperanto kaj montriĝis nur mallongdaŭra fenomeno.

Sub la gvidado de la juna sviso Hector Hodler, aro da Esperantistoj starigis la Universalan Esperanto-Asocion. Ili invitis al Mudie esti ĝia unua prezidanto, posteno, kiun li tenadis ĝis sia morto samkiel la prezidantecon de la Brita Esperanto-Asocio, kiun li transirigis de Pollen en 1912.

Kiam Ludoviko Zamenhof ricevis novaĵon de la publikigistoj Hachette, ke ili ne plu volis daŭrigi la eldonadon de la Biblio, Zamenhof finfine aranĝis nuligon de tiu mizera kontrakto, kiu dum tiom da jaroj sufokis lin. Melankolie li turnis sin al Mudie por helpo, indikante, ke li dediĉas nun ĉiom el sia libertempo al la “gravega” tasko traduki la Malnovan Testamenton, kaj ke li petas helpon trovi eventualan eldoniston por tiam, kiam la tasko finfine estos finfarita, post kvin jaroj.

Kun financa helpo de la fratinoj Priscilla (membro de la Internacia Oficejo de la Paco kaj kvarfoje

nomumita por la Nobel-premio pri paco) kaj Algerina Peckover, Mudie ja aranĝis, ke la Brita Biblia Societo eldonu ĝin, kvankam nek Mudie nek Zamenhof vivis sufiĉe longe por vidi ĝian aperon en 1926.

Dum kontinenta Eŭropo ekmoviĝadis por venonta milito, Mudie estis en Parizo la 14-an de aŭgusto 1914 por la malferma tago de la intencota deka Universala Kongreso, okazonta ĉe la Teatro Gaumont. Aliaj esperantistoj, inkluzive de Ludoviko Zamenhof, ne sukcesis atingi ĝin, returnigitaj je landlimoj.

Mudie dividis kun siaj kolegoj sian opinion, ke milito ne okazos, kaj aranĝis kunveni la postan tagon por kontroli, ĉu eblos fari ion por starigi la kongreson. Ni bone scias, kompreneble, ke li eraris kaj ke industria murdado estis ekokazonta nelonge for de tie, kie li staradis. Kaj tiu konflikto estis rabonta al Mudie sian vivon.

### *Frua morto*

Kiam erupciis milito Mudie tuj decidis servi al siaj lando kaj reĝo, kaj inter pluraj roloj respondecis pri ĉeval-liverado al la belga registaro. La direktoro de ĉeval-anstataŭado (*Director of Remounts*) priskribis raporton de Mudie pri ĉeval-transporto kiel “siamanieran gemon”, kaj pro tio “oni rangaltigis lin tiel rapide, kiel eble”.

Kaj tiel okazis, ke la Kapitano Harold Bolingbroke Mudie estis ĉirkaŭ Forges-les-Eaux apud Rouen, Francio la vesperon de la 6-a de januaro 1916, starigante tie la Ĉeval-anstataŭadan Deponejon (*Advanced Remount Depot*). Ĉirkaŭ la 21-a Mudie, vojaĝante kun Leŭtenanto-Kolonelo Petre, atingis trajnan vojkruciĝon. Ili vekis la dormantan gardiston, por ke li levu la barilon. Ĉiuj ne sciis, ke la ekspresvagonaro malfruiĝis je unu horo kaj proksimiĝadis al ili dum ili antaŭeniris. La vagonaro senbride traŝiris la veturilon, tuj mortigante Mudie kaj la ŝoforon, s-ro Augrand.

Kaj tiel rapide milito, kiu sencele ŝteladis milionojn da junaj vivoj, forprenis tiun de la ĉefa motoro de Esperanto en Britio kaj unu el la plej pintaj Esperantistoj en la mondo - tragedia akcidento, kiu prirabis liajn gepatrojn je sia solinfano, por ĉiam disŝirinte tiun familian unuiĝon, kiun laŭ la feriuma libro de Mudie ili nomis "la trio".

### *La posta tempo*

Informoj pri la morto de la prezidanto de la nacia asocio rapide atingis Brition. Abonantoj al *Esperanto Monthly* legis prie tutunue. La fakto, ke ĝi okazis en frua januaro signifis, ke eblis raporti prie en la februara *British Esperantist*.



La Brita Esperanto-Asocio esprimis siajn kondolencojn al la gepatroj de Mudie kaj aranĝis memorigan ceremonion ĉe Harecourt Church, St Paul's Road, Canonbury, London je 15:15 la 13-an de februaro. Ĝi ankaŭ fondis memorigan fonduson, kiu en 1918 fine generis £287, egala al £11 500 (ĉ. €16 000) hodiaŭ post alĝustigo por inflacio, kaj eldonis memorigan libreton "*H.B.M. An Appreciation*, kiu estis verkita dulingve kaj enhavis portreton kaj poemon de Rupert Brooks, *La soldato*.

Taŭge - konsidere, ke Mudie estis la filo de bibliotekista fakulo kaj la plej regula eldonisto de skribita Esperanto en la fruaj tagoj - BEA lanĉis la libroserion *Libraro Bolingbroke-Mudie*. La sola libro, kiu en ĝi eldoniĝis, estis *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat.

Harold Bolingbroke Mudie kuŝas en Forges-les-Eaux apud kvar siaj samlandanoj. Ĉe lia tomboŝtono oni legas, ke li estis la prezidanto kaj de la BEA kaj de UEA, kaj ke la homo estis *filantropo*. Tio li ja estis, la pinta pioniro de la Esperanto-movado en Britio. ■

## Memorige al Mudie

La 6-a de januaro 2016 estis la centjara datreveno de la morto de Harold Bolingbroke Mudie. Okazis ceremonio en Forges-les-Eaux, Francio, honore al la homo, kiu, kiam li forpasis, estis samtempe la prezidanto de la Brita kaj Universala Esperanto-Asocioj.



Antaŭ ol komenciĝis la ceremonio Tim Owen (reprezentante EAB) kaj Osmo Buller (UEA) staris apud la tombejo por private doni siajn respektojn.



Ĉirkaŭ la pordo amasiĝis la flagoj, inkluzive de la brita kaj Esperanta.



Kolonelo Michel Burin bonvenigis ĉiujn. Li invitis al Tim Owen meti florkronon nome de EAB. La urbestro kaj reprezentanto de la regionaj Esperantistoj faris same. Pompis la tombejo poste.



Klarionisto aŭdigis *Last Post*, tradician melodion ĉe memorigservoj de britaj soldatoj. Ankaŭ ludiĝis la himnoj brita (*Dio protektu la reĝinon!*), Esperanta (*La Espero*), kaj franca (*La Marseillaise*). Poste salutis Mudie la flag-portistoj.





Post la ĉefa ceremonio la ĉeestantaro kuniĝis en apuda konstruaĵo, en kiu Kolonelo Burin kaj Tim Owen rapide parolis pri Mudie.

Loka esperantisto Pierre Lemarchand prezentis Esperanton kaj ĝian historion.



Finiĝis la ceremonio per babilado kaj glaso da vino. La tri homoj respondecaj pri la starigo de la ceremonio pasigis kelkajn minutojn kune.

Maldekstre staras Tim Owen, kiu tutunue kontaktis la viron ĉe la dekstra flanko, Jérôme Moreau, por informiĝi, ĉu eblus fari ion memore al Mudie, post kiam li sciigis, ke Jérôme havas rilaton kun la enterigejo. (Jérôme estras *Héros de Forges-les-Eaux*, retejon dediĉitan al la soldatoj, kiuj tie enteriĝis.)

Jérôme kontaktis Kolonelon Michel Burin, kiu staras meze, kaj kiu ĉion aranĝis.

# Fuĝo ne eblas (sed nefuĝo belas)

Clare Hunter

BELA vetero, glaciaĵoj, bongustaj manĝaĵoj. Ankaŭ mi tre ŝatas tiujn kialojn vojaĝi eksterlanden, sed mi havas unu plian: pasigi iom da tempo for de Esperanto. Apenaŭ imageble, ĉu ne? Ĉiun jaron miloj da homoj vojaĝas eksterlanden aparte por viziti Esperantujojn! Kaj mi tute bone konstatas tion. Sed por homoj, kiuj pli-malpli ĉiun tagon devas okupiĝi pri Esperanto post reveno de la laborejo, kiel ekzemple mi dum la lastaj - kiom? - sep jaroj, estas agrable ne devi respondi al retroŝto dum eta momento. Do, unu celo de niaj eksterlandaj aventuroj pasintjare estis ne pensi pri Esperanto. Ĉu vi kredas, ke ni sukcesis?

Aldone al la kutima tutsemajna fuĝo, kiun faras ĉiuj, ni pasintjare malkovris, ke eblas multe pli turismumi, per frua sabata flugo kaj malfrua lunda reveno okaze de la publikaj feriotagoj. Do en malfrua majo ni iris al Gotenburgo, Svedio por kelktaga ripozado. Jen plaĉa urbo. Kaj kion ni vidis ne longe post nia alveno? ▼



Ne ofte en la vivo io tia okazas! Ni do troviĝis en *Esperantoplatsen*, eĉ sen scii, ke ĝi ekzistas! Rapide tio evidentiĝis. ▲

Tre plaĉe kaj ne atendite! Kaj kiel lerta ideo uzi herbejon kaj betonon por krei subpiedan Esperanto-flagon. Do, sensukcesa komenco al nia provo forlasi Esperanton en la hejmo, sed samtempe ni ridetis pro la ironio kaj ĝuis la sperton.

En aŭgusto ni vizitis Litovion dum unu semajno, fluginte rekte al Kaunas. La unuan tagon ni faris malmulton, sed la sekvan matenon ni esploris la urbon, kiam Tim fingromontris ion: ►



Mi ne povis kompreni, kiel ĝuste tia strato troviĝas en relative rimarkebla loko en la dua urbo de la lando. Tim klarigis al mi, ke la edzino de Ludoviko Zamenhof loĝis kun sia familio en Kaunas, kiam li ekkonis ŝin, do jen la verŝajna kialo. Foje povas esti utile loĝi kun iu, kiu interesiĝas pri la historio de Esperanto. Ne ofte, sed ...

La finan semajnfino de Aŭgusto ni vizitis Pragon. Tiun belan urbon ni jam vizitis unufoje – dum la somero de 2009, kiam ni survojis al Internacia Junulara Kongreso en Liberec – sed ĉi-foje ni intencis pasigi tute sen-Esperantan semajnfino en la ĉeĥa ĉefurbo. Ĉu ni sukcesis? Kompreneble ne! Ni apenaŭ estis dek minutojn en la urbocentro, kiam ni rimarkis ĉi tiun brikaron: ▶



Ŝajnas, ke kontraŭ iom da mono oni povas aĉeti kaj pentri ĉi tiujn briketojn, kiuj troviĝas ĉe unu el la ĉefstratoj, ne tro longe for de la stacidomo. La lokaj esperantistoj ne maltrafis la okazon varbi pri la internacia lingvo, kaj aĉetis pli da briketoj ol iu alia.

“Almenaŭ,” mi pensis al mi mem, “mi nun jam vidis la esperantaĵon de ĉi tiu ferio kaj povos ripozi dum la restaĵo de mia tempo en Prago.”

Sed ne! La sekvan tagon ni forlasis la urbocentron kaj serĉis unu el la antaŭurboj, kiu nomiĝas Vyšehrad. Survoje ni iom perdiĝis kaj senintence alvenis ĉe iu grandega kongresejo. Dum ni serĉis la ĝustan vojon, mi rimarkis



grandan ŝtonon, sur kiu estis verda stelo. “Ne, ne povas esti ...” mi pensis al mi ... sed evidentiĝis ke



Pri unu plia Esperantaĵo en Zagrebo mi tamen ja antaŭsciis pro antaŭa vizito, kaj tiun mi kaj Tim poste decidis viziti por kvazaŭ plenigi nian kolekton. Apud la ĉefplaco troviĝas bela tridimensia mapo de la urbo, kaj ĉe unu flanko de ĝi estas eta movebla sfero, sur kiu estas skribita la vorto “bonvenon” en multaj lingvoj. Dum mia unua vizito al Zagrebo mi miris pri tio, ke ankaŭ Esperanto estas unu el la lingvoj uzataj, sed nun mi kredas, ke nenio tiurilate plu kapablas mirigi min! ▶

Forlasinte Kroation ni pasigis kelkajn tagojn en Ljubljano, Slovenio, antaŭ ol forflugi hejmen de Triesto, Italio. Kion vi imagas, ke ni rimarkis dumpromene? ▼



Do jen, kiom sukcesa estis mia sen-Esperanta somero! Mi esperas, ke mi ne estas la sola, kiun Esperanto persekutas – ĉu ankaŭ aliaj kelkfoje trovas tute neatenditajn Esperantaĵojn dum siaj vojaĝoj? ■



Maltiom da tempo,  
tiom da Esperantaĵoj!

Ĉu ankaŭ vi rimarkis ion  
tian dum viaj ekster-  
Esperantuaj ekskursoj?

Se jes, bonvolu sendi la  
fotojn por venonta eldono  
de *La Brita Esperantisto*!

## Bildbabile



Sur mesaĝŝildo ĉe stacidomo en Brighton troviĝas plurlingva mesaĝo, ke oni ne rajtas fumi. Post la angla aperas pola versio. Kompreneble – la pola multe paroliĝas en nuntempa Britio. Sed kiu lingvo sekvas ĝin? Mirindaĵo!



Post longa labortago kaj prema EAB-rilata vespero, Clare Hunter petis de Tim Owen vinon por meti finon kaj ne plu devi pensi pri laboro. Ŝi ne kontentiĝis vidante la etiketon!



En julio Ian Carter kaj Simon Davies renkontiĝis ĉe Esperanto House por diskuti *La Brita Esperantisto* kaj – ŝajne rekte! – eltondi bonajn ideojn el pasintaj numeroj.

Hilary Chapman partoprenis la Tutkeltan Kongreson en Bretonio, okazinta inter la 13-a kaj 20-a de aŭgusto. Loka artisto memorigis por li la okazon. La grava afero estas, ke li kaptis la rideton!



Jam dum kelkaj jaroj, Ĉesterfildanoj atendas, ke la apudrivera tereno estu renovigita. Estos novaj hoteloj, restoracioj, kanalboatoj, ktp. Montriĝas, ke la nomo de la koncerna kompanio estas “Urbo”. Ĉu ili elektis tiun nomon intence, ĉu tute akcidente, ne klaras, sed ĝi estas ankoraŭ unu ekzemplo de esperantlingva vorto supozeble uzata pro ĝia simpleco kaj beleco.



Mortis antaŭ cent jaroj la “pinta pioniro” Harold Bolingbroke Mudie.